



8-8-1974

CGC Nº

00406 504/0001-06

Conselho Brasileiro de Esperanto

SEDE PRÓPRIA

Ed. Jockey Club, sala 103

Telefone (061) 226-1298

70.300 - Brasília - DF

PRESIDÊNCIA

Alameda dos Maruas, 471

Telefone (011) 275-1681

04.068 - São Paulo - SP

JUL/AGO/1983

BOLETIM INFORMATIVO

Nº 78

HEROO RENOVIGAS EMOCIOJN

Unu el la plej gravaj eroj en la programo de la 16-a Brazila Seminario de Esperanto okazinta en Ouro Preto estis sendube la teatraĵo "Minana Konspiro", ludita la 23-an de Julio ĉe la Komunuma Teatro de trupo de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, sub la reĝisorco de Reginaldo Lima Cipolatti, kiu estis la aŭtoro de la teatraĵo kaj ankaŭ ludis gravan rolon sur la scenejo.

"Minana Konspiro" (Konspiro en ŝtato Minas Gerais) estas teatra verko en la internacia lingvo, kiu riĉigas ne nur la esperantan kulturon sed ankaŭ la nacion, pro tio, ke, rezultante de esploroj ĉe Nacia Biblioteko en Rio-de-Janeiro, ĝi prezentas la faman historian fakton laŭ nova lumo kaj per elstara arta nivelo. Fakte la teatraĵo vekis grandegan intereson de la komenco ĝis la fino, estigante dum kelkaj momentoj profundan emocion, precipe kiam ĝi reproduktis la entuziasmon de la konspirantoj dum unu el iliaj kunvenoj kaj la emociemon de la heroo Tiradentes, majstre ludita de Amarílio Carvalho. Same kortuŝa estis ankaŭ la fina parto, kiam oni legis esencajn artikolojn de Deklaracio pri Homaj Rajtoj. La teatraĵo, el unu akto en naŭ scenoj, estis prezentita laŭ la kina tekniko; tion ebligis la uzado de sinsekvaj apartaj lumaj fokuso. Ĝia tempodaŭro estas unu horo kaj dek kvin minutoj. Jen la bravaj roluloj: Braz Cosenza (Cláudio Manuel da Costa); Laura Pereira de Alcantara (Marília); Lima Cipolatti

(Dirceu); Jair Salles (pastro Rolim kaj notario); André Luiz Fausto de Souza (José Álvares Maciel); Alexandre Fausto de Souza (pastro Toledo); Marcus Aurelius de Oliveira Moraes (Joaquim Silvério dos Reis); Álvaro Fausto de Souza (proparolanto kaj "Mantelkaŝito"); Luiz Carlos Alcides (sklavo); Olivia Vieira Soares (sklavino); Adonai Fausto de Souza (Alvarenga Peixoto kaj soldato); Sebastião Paulino Campelo (Freire de Andrade); Celina Maria Conceição Oliveira (malnova sinjorino), krom, kiel supre dirite, Amarílio Carvalho (Tiradentes). La modelistino estis Marly Oliveira.

Neforgesebla sceno okazis dimanĉon, la 24-an de Julio post prelego fare de fama oratoro Divaldo Pereira Franco: la seminarianoj iris al la statuoj de Tiradentes, en la centra placo de Ouro Preto, sur kiu ili etendis rubandon pri la Seminario, kaj, preninte inter si la manojn, ili formis rondon ĉirkaŭirantan la statuon, kriante: "Esperanto!" Tuj poste la ĉefaj roluloj de la teatraĵo, vestitaj kiel sur la scenejo, grimpis sur la statuon, de kie "Tiradentes" alparolis la publikon por rapide klarigi pri la Seminario kaj la internacia lingvo.

La teatraĵo kaj la aliaj eroj de la kultura programo de 1^a 16-a Seminario atestas, ke la brazilaj Esperanto-aranĝoj prezentas konsantan progreson kaj ke nun ili jam samnivele kun tiuj de internaciaj eventoj.

(WF).

BRAZILA KONSILANTARO DE ESPERANTO

HONORA PREZIDANTO

Francisco de Souza Almada - Av. Bernardino de Campos, 624 ap. 72, BR 11100 - Santos - SP

Estraro

Prezidanto: Carlos A. S. da Cunha, Alameda dos Maruás 471, Planalto Paulista, BR 04.068, São Paulo-SP

Vicprezidanto: Nelson P. de Souza, Caixa Postal 07-1182, BR 70000 - Brasília - DF

Kasisto: José Carlos Dorini Ramos - SHIN QI 02 - Cj. 08, casa 15 BR 71500 - Brasília - DF

Sekretario: F-ino Lêda da Silva Gama, SQS 306-A 101, BR 70353 - Brasília - DF

Kulturaj Aferoj: Walter A. Francini, Rua Afonso Bandeira de Melo, 35, Campo Belo, BR 04613, São Paulo-SP

Informa Bulteno

Dumonata Oficiala Organo de la Asocio
Jarabono Cr\$ 1.200,00

Asociaj membroj ricevas ĝin senpage

RESPONDECAJ DIREKTOROJ

Carlos A.S. Cunha (ĉefredaktoro), Nelson P. Souza kaj Walter Francini

Kunlaboraĵoj intelektaj estas bonvenaj. La estraro, tamen, ne respondecas pri subskribitaj artikoloj.

NAGAZAKO MEMORIGAS LA ATOMBOMBON

Berenice K. Eliot

Nagazako, 1983.08.15. Dum mia senfina pilgrimado tra la terglobo, centoj da altiraĵoj tre forte kaptis mian atenton. Mi devas tamen informi, ke nenio estas pli kortuŝa al mia profesia sentokapablo de internacia ĵurnalisto, ol la senbrida manifestacio de la homamaso.

Verŝajne pro tio, en la kuranta monato, granda publika spektaklo tiom streĉe emociis min, ke la dormanta fonto de miaj okuloj ne sukcesis kateni la elfluon de du pezaj larmoj sur miaj vangoj.

Ĉio okazis en Nagazako, havenurbo sudo-riente de Japanujo, kie mi laboradis dum tri semajnoj.

Per samtempaj sonorilfrapadoj en ĉiuj preĝejoj, pacaj surstrataj manifestacioj, kaj ekumena diservo—kiu kunigis katolikojn, budaistojn kaj protestantojn,—la popolo de Nagazako me-

morigis al la mondo la 38-an datrevenon de la militlitaĵo de la atombombo, kiu mortigis 74.000 personojn, la 9-an de Aŭgusto 1945.

Parolante antaŭ 20 mil personoj ĉeestantaj la parkon konstruitan kie efektive okazis la epicentro de la atoma eksplodo, la urbestro Hitoshi Motojima deklaris: "Nagazako nepre daŭru kiel la lasta urbo de la mondo, iam suferinta la atoman atakon".

Guste je la 11-a horo kaj du minutoj — horo de la fulma eksplodo antaŭ 38 jaroj — la tuta popolo en Nagazako silentis unu minuton, dum miloj da homoj ĵestis sin surteren, ŝajnigante ke ili estas la mortintoj pro la terura atako.

Kiel vidas la legantoj, tiom impresis min la scenejo, ke mi ne plu sukcesis forigi ĝin el mia retino. La plej grave estas, krom tio, ke mi ne scias kial tiu bildo persistas en mia subkonscio. Ĉu estus pro timo, ke la modernaj militopotencoj ne estus aŭdintaj la voĉon de la urbestro en Nagazako?

POST OURO PRETO ...

Ĉiuj venintaj al la Seminario en Ouro Preto adiaŭis tiun eventon kun granda espero, ke fine la brazila E-Movado vere unuiĝas. Por ni tio ne estas nura espero, sed ja certeco!

Heliĝas la horizonto; matenigas, kaj nova tago ekaperas. Fakte, post multaj jaroj nun oni ekpaŝas al tuta interkonsento. Jam ne estas nur paroloj, sed konkretak agoj, precipe la starigo de Regularo por la funkciigo de la Nacia Esperanto-Komisiono, kiu kunsidos ĉiun trian monaton.

Kaj ni jam povas ekpensi pri grandiozaj faroj per kuna agado; ekzemple Nacia Kongreso komuna de la 3 brazilaj organizoj, fakaj seminarioj, simpozioj pri plej diversaj temoj, regionaj renkontiĝoj, kaj super ĉio plej imponaj festoj por la Cetjara Jubileo.

Ni estu optimistoj! Tial ni alvokas ĉiujn per la Zamenhofaj versoj:

*"Staras ankoraŭ en la komenco
La celo en malproksimo, —
Ni ĝin atingos per la potenco
De nia forta animo!"*

*"Ni ĝin atingos per la potenco
De nia sankta fervoro,
Ni ĝin atingos per pacienco
Kaj per sentima laboro".*

Nelson Pereira de Souza

ABONO DE TIU ĈI BULTENO

La eldonkosto kaj afranko de tiu ĉi Bulteno estas nuntempe tro granda ŝarĝo por la buĝeto de nia Asocio. Tial, ni decidis sendi ĝin senpage nur al niaj asociaj membroj. Komence de septembro 1983, la leganto ankorau ne aliginta al BKE, sed kiu deziras daŭre ricevi la Bultenon, devas aboni ĝin, pagante jaran abonkotizon de Cr\$ 1.200,00.

Ni esperas, ke la legantaro bone interpretu kaj komprenu nian decidon kaj... pagu la koncernan kotizon, rekte al BKE en Brazilja.

FAKTOJ KAJ FOTOJ



Onézimo da Costa e Faria, unu el la ĉefaj respondeculoj de la sukcesa Seminario en Ouro Preto kaj s-ano Carlos Cunha, prezidanto de BKE.



La aktoroj de la "Minana Konspiro", alt-nivela teatraĵo prezentita en Ouro Preto, okazintaĵo pri kiu ni longe raportas en la unua paĝo.



Dum la inaŭguro de piedestalo kun Zame-nhofa medaliono, la 31-an de julio, en la Placo Afonso Pena, en São José dos Campos-SP. De maldekstre, estas S-ro José Dias Pinto, lia edzino, Prof-ino Elvira Fontes, D-ro Oswaldo P. Holanda kaj Carlos Cunha.

GUTOJ GRAMATIKAJ ...

MUISUZO DE LAŬ

En kontribuaĵoj por FONTO kaj ankaŭ en leteroj ŝokas min kelkfoje la malĝusta uzo de la prepozicio **laŭ** anstataŭ la konjunkcio **kiel**, en cetero neriproĉeblaj tekstoj. Eĉ presita jam apas tiu misuzo (Bulteno n° 75 de BKE), kiu minacas fariĝi brazila idiotismo, nepre tuj elradiki-genda. Certe ĝi ne fontas el la legado de Grabowski (PIV: ne konsilinde estas uzi **laŭ** en la senco de la kompara **kiel**, **kiel** faris Grabowski), sed el la subkonscia truduko de niaj konjunkcioj **conforme**, **segundo**, kiuj povas ankaŭ funkcii kiel prepozicioj. Kaj prepozicio servas por submeti substantivon, pronomon, aŭ esceptokaze infinitivan verbon (transira formo inter verbo kaj substantivo) sub alian substantivon, verbon, adjektivon aŭ adverbeton (PAG §24). La prepozicioj kiuj povas stari antaŭ infinitivo estas (PAG §117 k 186) **anstataŭ**, **krom**, **por**, **sen**, **inter** k antaŭ kun la interŝovo de la konjunkcio **ol**. PAG dirasplie: "la analoga formo **post ol** ne estas uzata" (Kial? demandas mi). Estas do malgramatike uzi prepoziciojn krom la supre cititaj antaŭ infinitivo, des pli antaŭ finitivo aŭ participo, kiel ekz. **laŭ anoncote**, **iru laŭ mi diras**.

VORTORDO KUN REFLEKSIVO

Komuna al la latinidlingvanoj estas la malĝusta ordo de negacio kun refleksivo, ekz. **li ne sin banas** anstataŭ **li sin ne banas**. En la unua frazo ŝajnas, ke **li ne** sed **iun alian** banas, almenaŭ skribe, ĉar parole en tiu kazo oni ja emfazas la refleksivon **sin**.

Leopoldo H. Knoedt



BRAZILAJ NOVAĴOJ

BRASÍLIA

● En la sidejo de BKE okazas ĉiuvendrede je la 20a horo Konversacia Klubo gvidata de s-ano Nelson Pereira de Souza, kun la celo ĉefa paroliĝi novulojn.

● S-ano Adolpho Miranda gvidas elementan kurson al 20 geknabon en unuagrada lernejo "Centro de Ensino Maurício Salles de Mello" (SHCGN, 708 Bloco "C", BR 70740-Brasília-DF). Ili deziras korespondi kun la tuta mondo.

● Esperanto-Grupo Ismael funkcia ĉe Brazília Spiritisma Federacio (Av.L-2 Norte, Q.603, 70.830-Brasília-DF) havas nun propran ĉambron dank' al la bonvolemo de la Estraro de FEB kaj al la pacienca laboro de s-ano Francisco Mattos, kiu kun samideanino Lia Milhomens kaj aliaj tie gvidas E-kursojn dum pluraj jaroj.

ALAGOAS

● Jen la nova estraro, elektita la 11-an de junio lasta, de Associação Alagoana de Esperanto (Av. Fernandes Lima s/nº, Bairro do Farol, BR 57000-Maceió); Prezidanto, Ezequias Alves; Vicprezidanto, Aristófilo Filho; Skretariino, Nancy de Medeiros Silva; Kasistino, Maria Neide Barros Fontes kaj Bibliotekistino, Maria T.C. de Almeida Mendonça.

BAHIA

● Assoc. Itabunense de Esperanto (Av. Gra-piuna 292, BR 45600 Itabuna) ree aktivas k elektis nova estraron, kies prezidanto estas Prof. Aderaldo Rocha.

● S-ano Eléus L. de Sá (Calçadão de Parana-guá 109, sala 101, BR 45660, Ilhéus) denove vojaĝis al Eŭropo, ĉifoje por ĉeesti la 68-an UK, okazinta en la ĉarma Budapeŝto.

● Libreto memore al la kuranta Internacia Jaro de Komunikado estas nun preparata de s-ano Ing. Hilmar Santana Ferreira (Centro de Pesquisa do Cacau-CEPLAC, Rodovia Ilhéus-Itabuna, BR 45600-Itabuna), kun oficiala apogo de E-Asocio de Itabuna kaj Ilhéus E-Grupo. La verko estas redaktota en Esperanto kaj en portugala lingvo.

● Laŭ informo de nia delegito, s-ano José Saraiva Matos, je la 14-a de julio kunsidis la anoj de Esperanta Studgrupo Zamenhof (Praça Anchieta nº 8, Terreiro, 40000-Salvador), por memori la daton de lanĉo de la unua esperanta libro, fare de la genia d-ro L.L.Zamenhof, en 1887. La sama grupo prezentis 15-minutan programon en la Radioklubo de Salvador, en 5/8/83, danke al la gentileco de s-ro Juarez de Oliveira, respondeculo pri la programo "Resenha Esportiva do Meio Dia". En tiu oportuno, oni

informis pri la movado en nia lando kaj s-ino Yvette Menezes Queiroz prezentis sintezan raporton pri la lasta Seminario en Ouro Preto.

● En la kadro de la festprogramo de la 30-a Semajno de la Spiritistoj el Vitoria da Conquista, realigota de la 1-a ĝis la 7-a septembro, okazos unusemajna E-kurso por komencantoj, gvidota de s-ano José de Oliveira Lima.

● Por kontentigi la ĉiam kreskantan nombron da interesitoj pri la lernado de Esperanto en Salvador, Bahia Esperanto-Asocio povas kunvoki jenajn novajn instruistojn: Cícero Soares, Emídio Brasileiro, Helder Alves da Silva, Kleber Oliveira Souza, Shyrlej Machado, Roberto de Almeida Neves, Ruy Guilherme C. Matos, kaj José Nilton Passos. En la urboj Jequié, Candeias, Santana, Coroaci, Santo Estevão, Cachoeira kaj Muritiba, kie multaj E-kursoj estis inaŭguritaj, agadas la samideanoj José Adson de Almeida, Marcelo Ferreira Rocha, Elias de Almeida Couto, Aldemar Vilela, José Borges kaj Manoel Borges, laŭ informo de s-ano Roberto A. Neves, Bravel Nian gratulon al la gvidantoj kaj kunlaborantoj de BEA, inter kiuj troviĝas niaj karaj geamikoj D-ro Noguti, Vivi Caymmi kaj Saraiva Matos.

CEARÁ

● S-ano Antonio José Ramos Alves gvidas E-kurson ĉe Centro Espírita União e Caridade Francisco de Assis (R.Sen.Catunda, 117, Benfica, BR 60000-Fortaleza) kaj eldonas bultenon "La Fratrondo".

GOIÁS

● Instituto Goiano de Esperanto (Av.Goiás 636, sala 104, 74000-Goiânia) havas kiel novan prezidanton la antaŭan prezidanton de BEJO - Fabrício Rodrigues do Valle. En la nova estraro aperas nomoj de novaj kaj malnovaj esperantistoj, kaj en ĝia enposteniĝo la loka televido faris raportajn.

MATO GROSSO

● BRATEG - Brazília Teatra E-Grupo (C.Postal 1089, 78000-Cuiabá) aktivas sub la gvido de nia kara Ciro Gomes de Freitas.

MINAS GERAIS

● Evandro Silva Martins (Rua Miguel Stafini 298, Jardim Induberaba, BR 38100-Uberaba), kune kun aliaj amikoj revivigas la E-movadon en Uberaba. Prof-ro Marcelo Palmério, rektoro de "Faculdades Integradas de Uberaba" (Caixa Postal 451), kunlabore permesis la malfermon de E-kurson por la universitatoj. Oni gratulu la rektoron kaj sendu al Evandro materialon por lernigado k propagando de la lingvo (Informa Servo G.A. Silva Velho).

● Horloĝvendejo Esperanto (Av. Minas Gerais 420, BR 35100 Governador Valadares) estas posedaĵo de nia individua membro, s-ano Jairo Rezende, kiu aktive agadas por la disvastigo de E. en tiu urbo kaj disponigas sian komercejon por la kunveno.

● Waner Marliere Arruda (R. Antonio Batista 89, fundos BR 36500-Ubá) instruas al kelkaj ge-

junuloj kaj anoncas, ke baldaŭ fondiĝos Departamento de Esperanto ĉe Spiritisma Templo João Ernesto, kie li estas prezidanto de la Spiritista Junularo.

PERNAMBUCO

- Geraldo Pires Sitônio (PY7AJB), el Recife (Rua Dom Vital 36, Boa Vista, BR 50000), ĉiutage partoprenas naciajn esperantan radiamatoran rondon, de la 6h00 ĝis la 6h30, en la frekvenco de 40 metroj, kiu inkluzivas radiesperanto-kurson. Sabate k dimanĉe, de la 17h00 ĝis la 18h30, en la 20-metra frekvenco, ankaŭ li paroladas al internaciaj radiamatoraj geamikoj.

- Post kelkaj tagoj, la samideano el Recife povas preni en la sidejo de Pernambuka Esperanto-Asocio (Rua Siqueira Campos 279, sala 905) la aligilojn por la IV-a Kongreso de Brazila Konsilantaro de Esperanto, realigota en la najbara urbo Olinda, de 12/15 novembro 1983.

- S-rino Maria José Pontes, individua membro de BKE kaj sindona bibliotekistino de Pernambuka Esperanto-Asocio, en la sidejo de tiu ĉi organizo gvidas ĉiusabate elementan k meznivelan kursojn de Esperanto, kiuj estas multe vizitataj.

RIO GRANDE DO SUL

- La Redakcio ricevis jurnaleltranĉaĵon, kiu raportas pri la esperanta agado de s-ano George Otto Vaske (PY3ACE) kaj diskonigas detalojn pri lia biografio. Vere laŭdinda estas ja la persona laboro de nia delegito Vaske, kiu loĝas en la urbo BR 95760 - Cai, ĉe straro Esperanto s/n-ro, straro kies nomon oni ŝuldas al lia persista instigo ĉe la antaŭa urbestro de Cai, d-ro Bruno Cassel.

- Por la jartrio 1983/85, estas jena la estraro de Esperanto-Societo de Porto Alegre (Rua dos Andradas 1137, conj. 1704): Prezidanto, Wenceslau Gonçalves; Viceprezidanto, Egon Breitenbach; Unua Skretario, Paulo I. Ereno; Dua Skretario, Solon Sant'Ana; Kasistino, Itamira Gomide; Bibliotekisto, A. Leivas Cardia; Konsilantoj, Dorval Pereira da Silva, Julião Rodrigues de Moura kaj George Otto Vaske.

RIO DE JANEIRO

- Dum la monato Aŭgusto, la estraro de Barra Mansa Esperanto-Klubo (Av. Joaquim Leite 465/506, BR 27400-Barra Mansa) patronis jenan festprogramon: 3/8, inaŭguro de Esperanta Ekspozicio en la ejo "Ponto de Ação Cultural-PAC, do CRECT; 12/8, prelego de Inĝ. Alberto Flores, en la Ĉambro de la Urbkonsilantoj; 17/8, inaŭguro de Elementa Esperanto-Kurso, en la sidejo de BAMEK, sub gvidado de Prof-ro Amarílio Carvalho.

- Rapidan kurson de Esperanto, je 4-hora tempo-daŭro, gvidis Prof-ro Sylla Chaves, la 20-an de aŭgusto, en la sidejo de BEL (Praça da República 54, 29 andar, BR 20211-Rio). Tie, je la 27-a de la sama monato, ankaŭ okazis debatoj pri la mortpuno. Enkondukis la temon, D-ro Mario Ritter Nunes kaj kunordigis la laborojn, D-ro Floriano Pessoa. En la debatoj, por defendi kaj paroli kontraŭ la mortpuno, respektive rolis D-ro Luiz Alberto Martins kaj Délio Pereira de Souza.

- Surbaze de informoj cirkulantaj en Ouro Preto, la nuna prezidanto de BEL intensas proponi al NEK (Nacia Esperanto-Komisiono), ke la tri landaj E-organizaĵoj kune okazigu venontjare grandiozan Brazilan Kongreson de Esperanto.

- Esperanto-Grupo I.G.Braga (R. Silva Cardoso 673 - Bangu, BR 21810-Rio) starigis Konkurson por Novaj Tradukistoj kun la celo instigi novulojn al pli profunda ellernado de Esperanto. Detalojn oni petu al la Grupo.

- Bureau de Numismática (C.Postal 12015-Copacabana-Rio), butikio de samideano Alcino Beiriz, vendas interalie la polan moneron je 100 zlotoj (kun vizaĝo de Zamenhof) en bela skatoleto.

- E-Klubo de Campos (Rua Tte.Cel.Cardoso 821, BR 28100-Campos) havas novan prezidanton, Vivaldo Marcelino da Silva, kiu promesas intensan laboron de la ĵus elektita estraro, en kiu partoprenas ankaŭ s-ano Joel Maciel Soares, kiel direktoro pri Instruado.

- S-ano D-ro Álvaro Fausto de Souza (R.Paulo Alves 100, Ap.503/E, Ingá, BR 24210-Niterói) ricevis peton de kuracisto-esperantisto el Kito (Ekvadoro), D-ro Patrício Zurita, kiu volas veni en Brazilon por fari esplordan sciencan pri: serĉado de cerbaj ondoj. Se iu povas helpi, bv.skribi al s-ano Fausto, kiu havas ankaŭ lian "Curriculum Vitae".

SÃO PAULO

- Nova Esperanto-Grupo ekeformiĝas en São José dos Campos, danke al la senlaca laboro de s-ano Roberto Lettieri kaj apogo de la urbestro, S-ro Robson R. Marinho.

- La geedzoj Dalva kaj Waldir Lisboa Roca unu fojon monate kunvenigas en sia hejmo (Rua Conselheiro Furtado 96, BR 01511-São Paulo) dekojn da gelnantoj, por praktikii konversacion.

- Prof-ro Valdemir Moreira malfermis la 13-an de junio kurson elementan por 130 komencantoj, en la Kultura Domo de São José do Rio Preto.

- En la tutsemajna festprogramo pro la 216-a datreveno de São José dos Campos, du specialaj eroj estis rezervitaj por Esperanto, en 31/07/83: inaŭguro de piedostalo kun bronza medaliono de Zamenhof en la placo Afonso Pena, memore al la eldono de la unua Esperanta libro, kaj kantprezantado de la konata Grupo Crisol, el São Miguel Paulista, en la teatro-kino Benedito Alves da Silva. Okaze de la inaŭguro de la piedostalo, multaj oratoroj paroladis publike, nome: José Dias Pinto, Amarílio Carvalho, Silva Velho, Elvira Fontes kaj Carlos Cunha. Al ĉiuj invititaj esperantistoj la urbestro oferis bongustan tagmanĝon en la nova urbodomo.

- Bauru Esperanto Asocio petis al NEK-Nacia Esperanto-Komisiono, ke ĝi agu ĉe Federacia Konsilio pri Edukado kaj, se necese, ĉe la koncerna Ministerio, cele al enkonduko de la internacia lingvo en la unuan kaj duan gradajn lernejojn, kun bazo en analiza laboro prezentita de prof-ro Euclides G. de Carvalho, dum la 11-a Kongreso de BKE en São Paulo, en novembro 1981.

- S-ano José Luiz Ferreira, loĝanta en São Paulo, estas la ĵus elektita prezidanto de BEJO, laŭ bolotado okazinta dum la Seminario de KKE, en Ouro Preto.



TRA LA MONDO

EL LA LASTA UK EN BUDAPEŬTO

★ Rajtigite de BKE-Prezidanto kaj de Kultura Kooperativo de Esperantistoj, Prof-ro Francisco S. Almada reprezentis la du Instituciojn en la internacia komitato de UEA en Budapeŝto kaj partoprenis la voĉdonadon cele al elekto de ties nova estraro.

★ Perdis siajn antaŭajn postenojn s-inoj Ursula Grattapaglia kaj Eliza Kehlet. La direktoraro de UEA elektita por la nova oficperiodo estas jena: Grégoire Maertens (Prezidanto), Humphrey Tonkin kaj Yosimi Umeda (Vicprezidantoj); Flora Szabó-Felső (Generala Sekretario), Renato Corsetti (Landa agado k planado), Barbara Despiney (Junularo k parto de eksteraj rilatoj), Roland Lindblom (kongresoj), Baldur Ragnarsson (Kulturo kaj Edukado) kaj Petăr Todorov (Faka Agado).

★ Aliĝis al la kongreso pli ol 5.000 geesperantistoj el pli ol 60 landoj.

★ Universalis Artista Ligo de Esperantistoj - UALE aranĝis ekspozicion, kiu aperigis verkojn de pluraj landoj, inter kiuj troviĝis kelkaj de s-ino Maria Almada, vicprezidentino de la Organizaĵo, kaj de du aliaj brazilaninoj, s-inoj Hilda Pasquarelli kaj Marlene Simão, el la urbo Santos-SP. Dum la kongreso, la anoj de UALE kunsidis kaj aprobis planon ĉiukongrese aranĝi ekspozicion kaj aperigi fakan informilon, kies unuan numeron aperigos s-ino Almada.

★ La komitato de EUA en Budapeŝto elektis, el la tuta mondo, kvar novajn honorajn membrojn de la Asocio. Inter ili oni elektis Prof-ron F.S. Almada, kio estas ja granda honoro ne nur por li mem, sed ankaŭ por la brazila E. Movado.

GRAVA FLUGFOLIO EL URSS

★ Kirova E-Klubo (Abonem Jaŝĉik 63, SU-610000 Kirov, Sovetunio) dissendas tre gravan flugfolion "Al la Parlamentoj, Registaroj, Politikaj Partioj kaj Popoloj de la Mondo" subskribitan de la Supera Soveto de URSS kaj de la Centra Komitato de Komunista Partio de Soveta Unio.

DUA TUTAMERIKA KONGRESO

★ Kion ni faros? Kie ĝi okazos? S-ano Santiago

Alvares (Apartado Aereo 54-800, Bogotá 2, Kolombio) dissendas cirkuleron Klarigante, ke estas neeble okazigi ĝin, ĉar "Bogoto havas nenian etoson..." Sed versajne ne estis reago kaj de alia kolombia urbo kaj de alia amerika lando.

TURISMO EN PORTUGALIO

★ Okaze de la 17-a Koferenco de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI), inter la 14-a kaj 22-a de julio, en Sintra, la loka Komisiono por Turismo eldonis plenkoloran faldfolion pri la regiono. Interesitoj povas peti ĝin de: Comissão do Turismo de Sintra, P-2170 Sintra, Portugalio (Esperanto, junio 83).



DONACOJ RICEVITAJ

Dum la du lastaj monatoj monhelpis la eldonkoston de tiu ĉi Bulteno jenaj asocioj kaj legantoj:

Lauro Coutinho	Cr\$ 1.000,00
Arlete Costa de Souza	Cr\$ 500,00
Orlando José Lopes Júnior	Cr\$ 1.000,00
José de Paiva Carvalho	Cr\$ 1.000,00
Jairo Pereira Rezende	Cr\$ 3.000,00
Geraldo José S. Andrade	Cr\$ 3.000,00
José Dias Pinto	Cr\$ 8.000,00
Álvaro Rabelo	Cr\$ 1.000,00
Álvaro Fausto de Souza	Cr\$ 1.000,00
Gilson Villas Boas Passos	Cr\$ 500,00
Gilberto A. Silva Velho	Cr\$ 3.000,00
Alcyr Guedes de Almeida	Cr\$ 1.000,00
Maria Julia J.R.da Cunha	Cr\$ 520,00
Hersíla Valverde	Cr\$ 1.000,00
Francisco S. Almada	Cr\$ 1.000,00
Cláudio Zimmermann	Cr\$ 1.000,00
Eluázio Bueno Rodrigues	Cr\$ 600,00
Baltazar Coelho Neto	Cr\$ 1.000,00
Azália Machado Dias	Cr\$ 1.000,00
Paulo Amorim Cardoso	Cr\$ 1.000,00
Lourenço R. Sogabe	Cr\$ 1.000,00
Maria Luisa Bilot	Cr\$ 2.000,00
Marco Aurélio R. Rabelo	Cr\$ 1.000,00
José Paulino Alves	Cr\$ 1.000,00

Ni sincere dankas ĉiujn donacintojn, kaj formas la legantojn, ĉefe tiujn, kiuj ne estas ankoraŭ aliĝintaj al BKE, ke iliaj monhelpoj estas bonvenaj. Ĉiun valuton oni sendu rekte al Conselho Brasileiro de Esperanto, en Brazilja.

BKE KONGRESOS EN OLINDA 12/15 novembro 1983



Supre estas la rektaj respondeculoj por la efektivigo de la IV-a BKE-KONGRESO okazonta en Olinda-PE, de la 12-a ĝis la 15-a de novembro 1983. Ili konsistigas la Lokan Organizan Komitato, nome (de maldekstre): Prof. J.M. Mabesoone (Prezidanto); D-ro Geraldo Pires Sitônio (Vicprezidanto), Amaro Pinangé Soares (Sekretario) kaj Inğ. Severino Nunes da Costa (Kasisto).

PRI LA 16-A BRAZILA SEMINARIO DE ESPERANTO

PAULO R. SANTOS
El la Loka Organiza Komitato

Tre eble la pluvo kiu falis dum la tri tagoj tuj antaŭ la Seminario igis multajn esperantistojn dubi ĉu ĝi efektive okazos aŭ minimume ĉu ĝi estos iomgrade sukcesa. Sed ni vidis, ke ĝuste en la matenuĝo de la 21-a de julio, la ĉielo fariĝis blua kaj helis dum la kvar tagoj de la Seminario, kiu, laŭ antaŭa promeso de la organizintoj, devus esti "historia", almenaŭ laŭ la loko.

Ĝia unua tago estis iom konfuza pro la nepretego de la akceptejoj, kaŭze de tiu pluvo, kiu falis ĝis la nokto de 20/07. Malgraŭ tiu malglatiĝo, la tri sekvaj tagoj sufiĉe kompensis la esperantistaron, kiu ĝuis en la Seminariejo la etoson de konstruaĵo el la XVIII-a jarcento (finkonstruita precize en 1779), tiam soldatejo de la portugaloj, por gardi "Vila Rica" dum la varmaj tempoj de la Konspiro. Ĝia kvadrata formo, kun korto inter dikaj muroj, kiuj ja malpermesis la eniron de la malvarmo en la dormoĉambrojn, igis nin reveni en la tempo, por plibone meditaĉi pri nia historio.

La prelegoj, la E-kursoj, la vizitoj al Ouro Preto, la kunvivado dum kvar tagoj kun homoj, kiujn ni plejofte revidas unu fojon jare dum E-kunvenoj, krom ankaŭ la belega panoramo kaj agrabla vetero, kvankam iom malvarma, ĵetis nin en alian mondon (Esperantujo!), kaj eĉ nokta malvarmo estis forgesata de la ĉeestantoj.

La antaŭlastan tagon (sabate vespere), ni spektis en la "operejo" teatraĵon (La Konspirantoj, en Esperanto), kiu estis minimume bela. Dimanĉe matene, post la matenmanĝo, denove al Ouro Preto — la "Vila Rica" de la konspirantoj, por ĉeesti prelegon de Divaldo Franco, kiu bonege paroladis pri la historio kaj estonteco de Esperanto. Post la reveno al Kolegio Dom Bosco, oficiala seminariejo, ĉiuj gustumis bongustan tagmanĝon kaj la tie ekzistanta sunhorloĝo jam montris la unuan horon, kiam la ĉeestantoj reciproke adiaŭis unuj la aliajn, por reveni al siaj ŝtatoj, urboj kaj hejmoj.

Tre pozitiva flanko de ĉi tiu seminario estas, ke pro la fakto, ke Kolegio Dom Bosco kaj Retiro das Rosas estas lokoj sufiĉe distancaj de Ouro Preto, la esperantistaro restis kune dum plejparto de la tempo.

Oni aŭdis pli da laŭdoj ol kritikoj kaj tio konsistigas fidindan monstrilon por taksii la sukceson de la Seminario. Al tiuj, ĉirkaŭ 300 homoj, kiuj ĉeestis, dankon kaj ĝis revido!

ĈU VI ESTAS MEMBRO DE BKE?

Kontraŭ pago de malalta sumo, vi povas fariĝi individua membro de nia Organizaĵo, voĉdoni kaj esti voĉdonita en la asembleoj, partopreni nian delegatan reton, uzi la ekzistantan informan servon en Brazilja kaj ricevi senpage tiun ĉi Bultenon.

La interesatoj sendu la aliĝkotizon (Cr\$ 3.000,00, por la kuranta jaro) kune kun informoj pri naskiĝdato, civila stato, kulturenivelo, telefonnumero, kompleta nomo kaj adreso, rekte al nia sidejo en Brazilja.

• • •

Por la kono de nia anaro, plezure ni anoncas la nomojn de la plej novaj individuaj membroj, por kies freŝaj aliĝoj la nuna estraro de BKE treege dankas:

Álvaro Fausto de Souza - RJ, Gilson Villas Bôas Passos - MA, Nelcy Zamora - DF, Onézimo da Costa e Faria - MG, Joel Maciel Soares - RJ, Ricardo Fernandes da Costa França - RJ, Lair Alves Moreira - SP, Edvaldo Silva Machado - MG, Waldemar Antonio Mendes - MG, kaj Maria Luisa Bilot - RJ.



DIRCEU PORCIÚNCULA

Ĝia biografio de la forpasinto, laŭ kortuŝa letero subskribita de D-ro Manoel Torres de Abreu.

"DIRCEU PORCIÚNCULA, UEA-delegito en Rio Grande-RS, naskiĝis en la vilaĝeto Curral de Pedras, komunumo Jaguarão-RS, la 26-an de Septembro 1906, kaj mortis je la 3-a de Majo ĉi-jare, en Porto Alegre-RS.

Liaj gepatroj estis Pedro Porciúncula kaj Florentina D'Esteban Porciúncula.

La unuagradajn kaj duagradajn lernadojn li faris en Urugvajo: Rio Braco kaj Montevideo. Poste li revenis al Stato Rio Grande do Sul kaj enmatrikuligis en "Escola Superior de Brigada", ricevinte de la posteno de leŭtenanto la 15-an de Novembro 1942.

Pri la aktivado de Porciúncula en la E-Movado ni povus skribi paĝojn plenajn je laŭdindaj agoj kaj, precipe, rimarkinda sindediĉo per kiu li neniam ŝparis diligentecon kaj kuraĝon.

Esperanton li ekiernis pere de la radiprograme de Carlos Torres Pastorino, en Rádio Ministério da Educação e Cultura.

En 1958 li fondis la unuan klason por lerni E-on, en Sociedade Espírita Kardecista, kies kunlaboranto li ankaŭ estis, en urbo Rio Grande. En la 15-a de Decembro 1961, post la Brazila Esperanto-Kongreso, en Porto Alegre, li kun la esperanta grupo Kardecista, fondis nian societon, tiam "Esperanto Societo de Rio Grande". Ekde tiam ĝi funkciis seninterrompe. Tie ĉi li estis nomita "ĉefa kolono" de nia enurba movado, tial ke li, ĉiusemajne, dum 24 jaroj sindone instruis Esperanton. Lia instrua laboro utilis al centoj da homoj, el kiuj multaj daŭris en la movado kaj progresis.

Pri lia personeco multon pli ni povus informi. Resume: li ĉiam estis tiu ĉarma kaj simpatiega homo preta vere brakumi iun ajn samideanon, kun tiu karakteriza rido, kiu konkeris ĉiujn, kiuj havis la feliĉon kunvivi li. . .

Ankaŭ lia voĉo ĉiam estis preta brave paroladi pri niaj pli gravaj enlandaj E-problemoj. Tial ke, dum Seminario en la urbo Santos-SP, li alvokis la brazilan esperantistaron al paciĝo. Lia personeco ja estis invito al paco! . . .

La estraro de BKE prezentas siajn kondolencojn al la konsternita familio de la mortinto, kaj preĝas por ke lia korpo ripozu en paco kaj Dio gardu lian animon.

D-RO VICTOR SADLER, OFICIALA GASTO DE LA URBO BAURU-SP

Plezure, ni transskribas tekston el letero de 05/08/83 subskribita de Prof-ro Euclides Geraldís de Carvalho, inda Prezidanto de Bauru Esperanto-Asocio kaj ĝema Delegito de BKE:

"D-ro Victor Sadler vizitis la urbon Bauru, en la 28-a kaj 29-a de Julio. Li vizitis la Fakultaton pri Filozofio kaj la du ĵurnalojn de la urbo, kiuj poste raportis pri lia vizito kaj pri ĝia celo. Vespere, li paroladis en Liceu Noroeste al esperantista publiko. En la sekvanta tago, la 29-a, li vizitis la Urbodomon, kie li ricevis, per la Dekreto n-ro 3920, de la 28-a/7/83, subskribita de la Urbestro José Gualberto Martins Angerami, la titolon "Oficiala Gasto de la Urbo Bauru". Tiu dekreto estis verkita en portugala lingvo kaj ankaŭ en Esperanto. Vespere, li paroladis en Lernejo Ernesto Monte, al neesperantista publiko, pri la temo Perspektivoj de la Internacia Lingvo. Post la parolado, la ĉeestantoj faris demandojn pri la temo kaj movado kiujn li bone respondis. D-ro Sadler, en la sekvanta tago forvojaĝis al Londrina-PR. Liaj paroladoj tre kontentigis kaj entuziasmigis la aŭdantojn, kaj li ankaŭ portis bonan impreson de la loka movado".

La Redakcio devas aldoni, ke D-ro Sadler faras tra nia lando longan agadvojaĝon cele al diskonigo de la utilo de Esperanto por multaj aferoj, ĉefe por tiuj ligitaj al la homa interkomunikado.

Dum lia restado en la ĉefurbo São Paulo, gastigis lin nia Prezidanto Carlos Cunha kaj Prof-ro Walter Francini, kiu sukcese venigis ĵurnaliston el "Folha da Tarde", por raporti pri la prelego elparolata de la klera vizitanto, la 8-an de Aŭgusto, en la sidejo de Esperanto Asocio de São Paulo. Tiu gazeto, en 8/8 aperigis, sub duko-lumna foto-kliŝo, tre altvaloran raportaĵon, kiu enfokusigis la ekonomian utilon de Esperanto por la Eŭropaj Parlamento kaj Komuna Merkato.

D-ro Victor Sadler eble partoprenos kaj prelegos en la IV-a BKE-kongreso, okazonta en Olinda-PE, de la 12-a ĝis la 15-a de Novembro 1983.

Centro de Cópia e Imprimiu

KRUCVORTENIGMO

Solve por la enigmo publikigita en nia Bulteno n-ro 77. **HORIZONTALA:** FOTO, BAZO, APRI, OMON, RIO, KONK, BONEGA, OL, SEL, PN, KAOLIN, ORDA, ALI, POMP, OREA, OLEO kaj AĜOJ. **VERTIKALA:** FARB, OPIO, TRON, OI, BOKALO, AMO, ZONO, ONKL, ESKAPO, GEA, POPO, NROL, LARG, ILEO, NIAJ, DME kaj OA.